

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

Internacia

SEMAJNA

Neŭtrala

Abono ĉiu pagas laŭ la tega kurzo de sia propra valuto, se eble per ŝtataj monbiletoj ĉi rekomendita letero, aŭ per ĉeko, sed ne per poŝtmandato. — Abonantoj, kies abono estas ŝnigonta, ricevas ĝustatempe admonojn. — Abonoj povas esti komencataj per la ajn numero. —

Por Abono oni sendu laŭvole altan sumon, kaj ni liveros tiom da numeroj, por kiom valoras la pago. — Prezo de unu numero: 0.06 dolaro, 0.15 guld., 0.24 ŝved. kr., 0.50 ŝvis. fr., 0.50 dana aŭ norvega kr., 0.50 peseto, 3 1/2 pencoj, 0.50 fr. aŭ belg. fr., 0.70 lir., 1.20 lmk., 1.40 ĉ. kr., 3 germ. mk. (ankaŭ por baltaj kaj balkanaj ŝtatoj; por rusoj 1 germ. mk.), 7.50 hung. kr. — 35 pol. mk., 35 aŭstr. kr.: internacie 1 1/2 respond-kuponoj. —

Por adresŝanĝoj ni kalkulas la prezon de 3 numeroj. — Liston de niaj Abonejoj en diversaj landoj vidu sur paĝo 4! — Germanoj ĝuas altan profiton, se ili abonas ĉe la poŝto (Postzeitungsliste, 13. Nachtrag, Ergänzungsheft n-o 3, paĝo 280, sub „Kunstsprachen“). —

ELDONANTOJ:  
D-ro L. Zamenhof, Warszawa (Varsovio)  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
J. Gilli Norta, Barcelona  
Teo Jung, Köln (Kolonjo)  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bankdirektoro, Kaunas (Kovno)

REDAKTOROJ:  
Ĉef-redaktoro: Teo Jung.  
Kun-redaktoro: M. Butin.  
Felletona red.: Zanoni.

ADMINISTREJO:  
Horrem bei Köln, Germ.  
Poŝtĉekkonto Köln 70865,  
por Teo Jung, Horrem.

ANONCOJ  
el ĉiuj landoj 4 gm., po  
cm<sup>2</sup>, ĉe grandaj aŭ ripet-  
ataj anoncoj rabato.

Bonvolu daŭre atenti  
tium ĉi lokon, kiu re-  
gule enhavos ion  
gravan por vi!

Numero 78 :: Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa :: 2. Aprilo 1922.

## MONTREUX.

### Priskribo de Montreux.

Nomita „Malgranda Nico“ la bela urbo Montreux estas preferata restadejo de fremdlandanoj. Altaj montoj ŝirmas ĝin de la norda flanko, kaj la lazura lago Lemano varmigas ĝin. Kontraŭe staras la Alpoj de la „Savoie.“ Iam la urbo Montreux apartenis al tiu ĉi lando. Ankorau nun la kastelo Chillon, kies muroj banas en la ondoj lagaj, memorigas pri tiu tempo. La poeziplena kastelo estas prikanita de la angla poeto Byron. Dudek vilaĝoj troviĝas sur la deklivoj de la montaro, ĉirkaŭanta Montreux. Sur la montoj vidiĝas belaj arbaroj kaj vinberujoj, inter kiuj staras hoteloj, kampdomoj kaj montaj dometoj, nomataj „chalet“.

Belega kajo iras laŭlonge de la lagobordo, kie en la ombro de kaŝtan- kaj platan-arboj estas tiel agrable, tiel kviete ripozi! Ankaŭ bonaj vojoj ebligas la promenadon en la montaro, — pri tio zorgas la „Societo por la Pliheligo de Montreux“.

Apartan, neforgeseblan belecon prezentas Montreux dum la florado de la narcisoj. Ĉi tiu floro estas la emblemo de Montreux. Fine de majo aŭ komence de junio ekfloras la narcisoj sur la montaro. Kvazaŭ nova printempa neĝo prezentas sin al la okuloj de la ravita rigardanto la kampoj florantaj; la ebriga aromo disvastiĝas ĉiuflanke. — La Montreux'anoj festas la floradon de sia preferata floro per aro da amuzigoj, kaj dum tri tagoj daŭras la famkonata „Festo de Narcisoj“. Festaj procesioj, iluminacioj, barkoj fantaziformaj ornamitaj per floroj — ĉio estas vidinda kaj, en la kadro de la mirinde bela naturo, transportas vin en la landon de la sorĉaj fabeloj. Ĉio kuniĝis por fari el Montreux la revolucion, benitan terangulon.

Leon Bonzon, Montreux.

### La klimato de Montreux.

La klimato de Montreux estas tre agrable. En somero la temperaturo estas tre varma, sed la lago kaj la ĉirkaŭaj arbaroj sur la montoj moderigas la varmon. La temperaturo ne ofte atingas tridek gradojn en la ombro.

Fulmotondroj estas maloftaj en Montreux kaj ne danĝeraj, ĉar la ĉirkaŭstaranta montaro kaptas la fulmojn

### Le Selx qui pliaŭ.

(La roko, kiu ploras.)  
Montreux'a legendo.

En la silento de la arbareto monta susuras nelaŭte, kvazaŭ larmsopiro, la sono de falantaj gutetoj: tio estas la ŝtonroko ploranta. Kvazaŭ larmoj perligas akveroj el malmola ŝtono kaj larve malsuprenfluas: Tiu ĉi roko ploranta sola meze de la lumradia naturo, en la arbaro, superverŝita de la ridanta suno, trablovita de venteto, venanta de la lago lazurkolora, memorigas pri bela, kurtuŝa legendo.

Joliette, filino de montarano, kaj Jean-Louis, filo de barono de Chanlieu, amas unu la alian. Sed, ho vel ili ne povas geedziĝi, ĉar la fera barono malpermesas la kuniĝon de sia filo kun simpla montaranino. La gejunuloj malgajaj, senesperaj, renkontis sin foje en la alfestaranita montara preĝejo dimanĉe kaj arde preĝis al Di-Sinjoro, petante kompati ilin kaj ebligi per Dia volo ilian kuniĝon. Konsolitaj per ilia preĝo, esperante, ke ilia amo fine venkos la obstaklojn, la geparo estis revenanta kun aliaj preĝintaj, malsuprenirante la monton tra la arbaro. Subite aperis la barono rajde kun sia sekvanaro. Ekvidante sian filon kun la knabino, li ekkolereis kaj ordonis al sia servisto kateni ilin. Obtuzaj murmuregoj ek-aŭdiĝis inter amasiĝintaj kamparanoj kaj montaranoj, sed nur unu sepdekjara maljunulo kuraĝis defendi la amparon. „Pendigu ŝin!“ ĉekriis la barono, „ŝi ankaŭ estas kontraŭ mi!“ Ĉiuj estis rigidekonsternitaj kaj la virinoj ekploregis. „Mi malatentas la plorojn,“ kriis kolerege la sinjoro, „ĉu oni povas mildigi mian koron per virinaj larmoj? Eble, nur se ekploras ĉi tiu roko, mi konsentus je la geedziĝo de ĉi tiuj mizeruloj!“ Kaj li montris la ŝtonrokon, kiujstaris antaŭ li



Panoramo de Montreux apud Lago Lemano.

La vintro estas en Montreux aparte agrable — la ellagaj vaporoj varmigas la aeron, la montoj ŝirmas la landeton kontraŭ malvarmaj ventoj. Samtempe la abunda neĝo sur la montdeklivoj super Montreux ebligas ĉiusecajn sportojn. Oni konstatas — dum dudek jaroj — nur dufojan malaltiĝon de la temperaturo ĝis dek sub nulo. La neĝo, kiu kuŝas preskaŭ la tutan vintron ĉirkaŭ la urbo, ne restas longtempe en la urbo mem. La frua printempo estas tie la plej ŝanĝema sezono; la varmon rapide anstataŭas malvarmeta venteto, sed tamen ĝi ne montras tiom da printempaj surprizoj, kiom aliloke. La plej bela sezono estas, sendube, la aŭtuno, — modera varmo, pervinbera kuracmetodo, la mirinde bela koloriĝo de l' velkanta verdaĵo... kaj super ĉio hela, blua ĉielo. La aŭtuno estas sufiĉe longe-

daŭra, ĉar ne konataj estas en Montreux la nebuloj, la nordorientaj ventoj.

Resume, la klimato de Montreux estas unu el plej agrablaj de eŭropaj klimatoj kaj ankaŭ preferinda pli ol multaj el ili, pro sia modereco. Malsanuloj kies spirorganoj suferas pro la malsekeco en la aero, pro la ventoj, certe trovas en Montreux sanigan restejon, kie, ĝuante la varmecon, ili tamen ne malkuitiĝas tute de la vintra malvarmo, kaj tial la reveno al klimato pli malvarma ne estas danĝera al ili.

Fritz Christen, Villeneuve-Montreux.

### La turismo en Montreux.

Eble ne ekzistas ie alia klimato, kiu tiom ebligas la okupiĝon pri sporto kaj turismo. Dank'

En ĉi-tiu momento tiu kolosa maŝinego ŝajnas esti senanima monstro, vekanta timon... Tio estas la ŝifinko, kuŝanta sur cementa bloko. Ĝi ŝajnas esti pezo, senforma, ŝajnas esti monstre malsaneca kaj mallerta elpensajo de freneza fantazio.

Unusola lampo pendigita ĉe la flanka muro jetas malagraban lumon sur tabulon, meilitan vertikale kaj laŭlonge signitan per linioj. Ĉe ĝia supro sur fadenon pendas triangulo en formo de koro. Antaŭ la maŝino sur podio staras la maŝinisto. En la dekstra mano li tenas brakon de l' haltigilo, per la maldekstra li regulligas ventolan radeton. Li staras senmove en la krepusko; kaj lia lacigita rigardo fiksigas sur tiu brilanta linio, sur tiu tabulo, ĉe kies supro pendas la koro. Ekster la muroj bruegas specigmaŝinoj, traŝutiĝas karbo, aŭdiĝas knaro de vagonetoj kaj miksitaj homaj voĉoj; disetendiĝas vera infero de tonoj kaj murmuroj.

En tiu momento oni dufoje ekskuis sonorilon, fiksitan super la svingiga rado. La maŝinisto iom turnis la ventolilon, nerimarkeble ekmovis la haltigilon. La kolosa korpego de la maŝino vekigiĝis, levigis laŭvice leviloj de pistoj, ekiblis vaporo el cilindroj. Sed la monstro ankoraŭ ne tute vekigiĝis. Oni dufoje ekskuis sonorilon. Grandega rado komencas malrapide turniĝi, leviloj levigas kaj mallevigas laŭvice, kvazaŭ manegoj, pli kaj pli rapide, mallaŭte, kiel la piedoj de monstro el la speco de l' katoj, malpeze, lerte. Tiel moviĝas la kolosa maŝinego, atingas furiozan rapidecon, la koro sur la tabulo falas kun timiga rapideco malsupren. La koro — estas vagoneto!

La vojo, kiun ĝi trakuras, prezentas — sur proporcio mallongigita skalo — la profundecon de l' ŝakto! Jam, jam ĝi atingas la fundon, post momento ĝi disrompiĝas en la profundecon. Sed

al la diversa ĉirkaŭaĵo de la ideale kuŝanta antaŭmonta urbo, ĉiu turisto trovas ion laŭ sia plaĉo... Se iun interesas la montaro — la malalta aŭ la alta — al sia dispono estas multegaj vojoj kaj vojoj; se li volas vojaĝi per fervojo — multaj fervojoj montaraj, kablaj, transportos lin tiel alten, kiel li deziras... Se lin interesas vintrotransporto, li havas ĝin ĉiuseca super Montreux, en la peĝo, sur la glacio... Ĉie staras sur la montdeklivoj hoteloj, luksaj kaj moderaj. Se li estas turistofotografisto, li ne trovas pli mirindajn, pli pentindajn videojn, ol kiuj sin prezentas al li sur la lago, la montaro, la kontraŭkuŝanta bordo de l' francujo... Se li preferas la akvon, li povas vojaĝi en vaporsipo, en boatetoj, en velbarkoj... Ĉiun eblon al ĉiuseca turisto amuziĝi meze de la fabelbela naturo donas la turistaj kluboj en Montreux: grupo de la „Svisa Alpoklubo“, grupo de „Naturamikoj“ (Internacia turista klubo), kaj la grupo de la „Svisa Virina Alpoklubo“. Tiuj societoj faciligas ĉiel la turismon, ĉie en la montaro ili starigis ŝirmdometojn, aranĝas ekskursojn ktp.

La Oficejo por Turistoj (Bureau des Renseignements, Verkehrsbiro) respondas senpage al ĉiuj, kiuj deziras viziti la belan terangulon, nomatan Montreux.

Karl Hiltpold kaj s-ino Veytaux,  
Chillon, près Montreux (Vaud).

### La fervojoj de Montreux.

Montreux kun siaj ĉirkaŭaĵoj posedas fervojojn, kiuj ebligas al vojaĝantoj kaj turistoj la vizitadon de tiu ĉi mirinde bela lando.

Unue, Montreux kuŝas sur la linio de la granda fervojo, kiu transiras la svisan „Rivieron“ laŭlonge de la Lago Lemano, aliuŝante la belajn urbojn: Genève, Lausanne, Vevey kun iliaj antaŭurboj. La sama fervojo atingas Italion per la tunelo de la Simplono. Preterpasas ankaŭ la ekspresvagonaro Paris — Konstantinopolo.

Sed la plej grava, plej rimarkinda estas la linio fervoja elektra Montreux — Oberland-Bernois (Bern Oberland). Ĝi transkuras la montaron, levigante ĝis alteco de 1300 m.

Ĝirinte el la stacio Montreux, oni ŝanĝas la vagonaron en Vevey. De tie grandioza, neforgesebla panoramo de la lago, de la montegoj ĉarmas la ravitajn okulojn de la vojaĝantoj. Oni atingas baldaŭ „les Avants“, konata stacio de sportoj en vintro, belega printempe pro la florado de narcisoj kampoj. Poste oni veturas sub la montego „Dent de Jaman“, en tunelo 2800 m. longa. Sovagaĵ valoj kaj verdaj paŝtejoj ĉirkaŭas

denove aŭdiĝas dufoja sono, la svingiga rado malrapidiĝas, leviloj levigas pli kaj pli malrapide, la koro atingas la fundon kaj haltas, la korpo de l' maŝino jam estas senmova, senpova. La maŝinisto ne deturnas siajn okulojn de la brila linio, unu mano sin apogas sur la ventilo, dua tenas la haltigilon.

Ekster la muroj la specigiloj bruegas pli kaj pli laŭte, en la halo regas malhelo kaj neeksprimebla streĉeco. Denove aŭdiĝas dufoja sono de l' sonorilo, la maŝino ekvivigis, la svingiga rado komencas furiozi, leviloj, kvazaŭ grandegaj kataj piedoj, levigas kaj falas, mallaŭte, rapide.

La koro sur la tabulo atingas la supron, jam finiĝas la supreniro tra la ŝakto, la monstro kvietiga, kuŝiga; nun, tie, oni eligas karbon el la vagonetoj, kaj ĉie estas karbo, karbo, karbo!

Denove sonas la sonorilo! Sed kio estas? Ha, kvarobla signalo! Ministoj malsupreniras en la ŝakton. La maŝino moviĝas kviete, singardeme paŝas la korpo de l' monstro, mallaŭte, lerte, la koro de l' tabulo malsupreniras malrapide eĉ iom pli malrapidiĝas, haltas: la vagoneto kun la ministoj atingis la fundon. Aŭdiĝas signalo. Du batoj! La mano ektaŝas la haltigilon, turnas radeton de l' ventolilo, la svingiga rado kuregas, komencas denove furiozi.

Jam pasis meznokto, jam delonge ĝi pasis. Tie, ekster la minejo, ekster la kortoj, estas malhelo en la domoj, la homoj dormas jam delonge, eble tuj komencos vekigi. Unu momenton ŝajnis, ke la specigilo mallaŭtiĝas tie, ekster la muro... Ne! ili tondras senĉese, nur songo preterflugis super la kapo de l' maŝinisto... Sed li forskuas la lacecon, jam denove li estas vigla! Li bone aŭdas la signalojn kaj perfekte ilin distingas. Preskaŭ ĉiujfoje du batoj! Venas karbo, nur karbo! La maŝinego laboras konstante, memstare,

vin. Nun vi atingas „Château d'Oex“, bela lago, preferata restadejo de angloj.

Sekvas montaraj stacioj Saanen, Gstaad kaj Zweisimmen, famekonataj pro sia pura, saniga aero. En Zweisimmen oni prenas la montarajn vagonaron por sin direkta al Interlaken—Luzern. Ne forgesbla estas tiu vojaĝo. Valoj sekvas post teruraj abismoj, pacaj paŝtejoj post rapidaj akvofaloj kaj fontoj. Ankaŭ pli malgrandaj fervojlinioj ebligas la vizitadon de proksimaj ĉirkaŭaĵoj de Montreux: vi atingas „Gilton“, suprenstarantan Montreux, kies hoteloj sin kaŝas en arbaroj, kie kuŝas neĝo, kiam en Montreux, malsupre, estas jam varme. Ankoraŭ pli alte vi atingas Caux, kie staras grandega hotelo, brilanta nokte per multege da lumoj. De tie per vapora fervojo oni atingas „les Rochers de Naye“, krutan, glatan aron da rokoj kovritan de ĉiama neĝo, 2100 m. altan.

Kelkaj malgrandaj fervojoj kaj kablovojoj transportas turistojn al beletaj montaraj stacioj Blonay, Pleiades, Montfleuri. Tiamaniere la loĝanto aŭ vizitanto de Montreux estas servata bone de multe da fervojlinioj, kiuj lin transportas laŭplaĉe en iun ajn belan angulon de la ĉarmplena lando.

Maurice Frieden, fervojoŝtelisto ĉe la vagonaro Montreux-Oberlando Berna.

## Hoteloj de Montreux.

Ne nur pro sia bela naturo estas Montreux unu el agrablaj, ripoziga restadejoj de Svislando. Multe da komfortaj, eĉ luksaj hoteloj ebligas ĉi tie la vivadon: dum la bela printempo, mirinda aŭtuno (pervinbera kuracado) kaj ankaŭ dum la vintro kun multenombraj vintraj sportoj.

La diverseco de la hoteloj, ĉirkaŭita de ĝardenoj, ĉe la laga bordo, aŭ sur la montodeklivoj, permesas loĝi en Montreux al princo kiel al simpla rentulo.

Inter hoteloj luksegaj ni povas citi „Montreux-Palace“ (400 ĉambroj) apud la lago, „Grand Hotel des Alpes“ (400 ĉambroj), hotelo „Eden“.

Inter la hoteloj pli atingeblaj por modestaj monuloj estas citinda hotelo „Richemont“, apud la Montreux'a „Kursaal“, el kies fenestroj estas admirebla la tuta kajo — de la legenda kastelo „Chillon“ ĝis la fabelaspekta insuleto „Salagnon“, nomita „Insulo de Mevoj“ (ankaŭ ĝi meritas la nomon „Insulo de Revoj“). Ni rekomendas ĉi tiun hotelon al ĉiu vizitanta Montreux.

Belega Kursaal-Kazino koncentrigas amuzigaĵojn kaj koncertojn; teatraĵoj kaj dancado okazas tie.

Ankaŭ oftaj estas en Montreux sciencaj konferencoj, paroladoj pri interesaj temoj, faritaj de lokaj aŭ fremdaj profesoroj.

Ĉio tentas veni en nian sorĉfabelan landon, — kiu venos, ne plu volos ĝin forlasi. Li nur venu! *Jean Epinay*, komitatano de „Lemana Stelo“, 32, Grand' Rue, Montreux.

## Historio de la Esperanta Movado en Montreux.

La Esp. movado en Montreux estas ankoraŭ tre juna. Kelkaj amikoj de Esperanto izolitaj, inter aliaj s-o G. Messenger kaj s-o Frej, la lasta en la nomo de l' socialista partio, petis la delegitnon s-inon Alexandra Mexin instrui Esperanton en Montreux. Ili ĉiuj, komence de la jaro 1921, formis grupon, kiu ricevis la nomon „Lemana Stelo“.


Tuj la grupo komencis fervore labori. Komence de februaro d-ro E. Privat, laŭ la invito de la grupo, faris paroladon, kaj baldaŭ komenciĝis kursoj, gviditaj de la delegitino.

Post 11-semajna unuagrada kurso okazis ekzamenoj, je kiuj ĉeestis estinta bulgara ministro

de la Popola Klerigado s-o Ŝiŝmanov. Post la ekzamenoj sekvis amuziga propaganda vespereto; la novaj Esperantistoj deklamis, kantis Esperante ktp. La vespereto allogis sufiĉe da publiko kaj la mono, aperinta en la kaso de la grupo, permesis aĉeti kvanton da libroj por fondita grupa biblioteko. La unuan de oktobro dua vespero kun teatraĵo pliriĉigis la grupon kason. Komence de februaro 1922 sub la patronato de l' grupo „Lemana Stelo“ fondiĝis infana grupo „Fajrero“.

La nuna komitato estas jena: Prez. Belloni, vicprez. P. Pione, M. Pict, kas. Ed. Bellion, bibl. f-ino Saenger. Membroj (helpantoj) L. Bonzon kaj F. Christen, honoro prezidanto d-ro Privat.

A. Belloni, prezidanto de la grupo „Lemana Stelo“ Montreux.



Chatelard kaj la Alpoj de Savoie.

## Delegitoj por Genève.

Italaj delegitoj por Genève.

La konsilantaro de „Esperanta Domo“, de „Lombardia Instituto de Esperanto“ kaj la komunuma estraro de Milano elektis kiel oficialajn reprezentantojn ĉe la Genève'a Konferenco pri la enkonduko de Esperanto en lernejoj s-ojn Ippolito Piatelli kaj Pietro Rota, ambaŭ instruistojn en Milanaj lernejoj kaj docentojn de la Itala Katedro de Esperanto, kaj f-inon Domenica Pomarici, instruistinon en lernejo de Legnano kaj docentanon de la Itala Katedro de Esperanto.

Sveda Esperanto Federacio

elektis kiel sian delegiton por la ĝeneva konferenco s-on gimnazian instruiston Elias Beckman el Gevle. La honora prezidanto de la Sveda Esperanto Federacio, s-o Paul Nylén, vizitis la ministrinon por instruado petante, ke li elektu s-on Beckman kiel ŝtatan reprezentanton je la konferenco. La decido de la ministro ankoraŭ ne estas konata.

## Spiritismo.

En la lasta tempo mi kelkfoje partoprenis en spiritistaj kunvenoj. La fenomenoj, kiujn mi vidis tie, min strange impresis. Ofte mi imagis, ke mi aŭdas fantoman frapadon en la mebloj, sed ĉiujfoje mi konstatis, ke mi estas viktimo de senterarc.

Unu vesperon mi revenis hejmen post tielnomata „seanco“. Mi enlitigis kaj pripensante tion, kion mi vidis kaj aŭdis dum la vespero, mi iom post iom atingis animstaton, en kiu mi ne povis distingi, ĉu min ĉirkaŭas realaĵoj aŭ imagaĵoj; kredeble mi jam duone ekdormis. Subite mi aŭdis, ke iu paŝas en la ĉambro. Mi streĉis mian atenton kaj iom atendis. Nun mi estis plene maldorma. Regule paŭzante iu proksimiĝis al mia lito per sintrenaj, ŝteliraj paŝoj. Precize mi aŭdis la surradon sur la planko. Mi pripensis ĉu voki aŭ ne. Ankoraŭ mi hezitis. Jen denove la misteraj paŝoj! Mi ekenergiĝis kaj vokis per firma voĉo: „Kiu iras?“ Neniu respondis; sed post iom da tempo la bruo ripetiĝis. La ĉambro estis tiel malluma, ke mi povis distingi nenion. Mi konfesas, ke mi ektimis. Mi etendis palpe la manon, por serĉi almetujon sur mia noktoblo. Mi eklumigis la kandelon, sed vidis — nenion eksterordinaran. Tamen la paŝad-simila bruo daŭris post regulaj paŭzoj. Sed nun ŝajnis al mi, ke ĝi elvenas el la ŝranko. Mi leviĝis kaj kun la kandelino en la mano kontrolis la ŝrankon interne kaj ekstere: nenio krom — regula paŝado. Kun granda peno mi movis la ŝrankon for de la muro. En la sama momento io falis teren kun mallaita, siblanta bruo. Mi rigardis inter muron kaj ŝrankon kaj ekvidis grandan Esperantan standardon, kiun mi metis sur la ŝrankon antaŭ kelkaj semajnoj. Kredeble ĝi falis en la malvastan spacon inter

## Scienco.

Alvoko al la Esp. kuracistoj.

Kiam mi ekkomencis la agadon por la „Internacia Medicina Revuo“, mi sciis, ke ĝi povos ekzisti nur sur forta financa fundamento. Tial mi alvokis la kuracistojn de la bonvalutaj landoj, ke ili helpu al mi per fonda de garantia kapitalo. La alvokon respondis 12 kolegoj, kiuj promesis la alsendon de la garantia sumo. Kiam mi finis la antaŭlaborojn kaj, bazante la eldonon je la promesitaj garantiataj sumoj, petis de la kolegoj la tujan alsendon de la mono, tri el ili sendis ĝin, la aliaj silentis kaj silentas. Mi deklaras, ke al la garantiataj mi resendos la monon, ĉar ĝi jam ne estas necesa. La „Internacian Medicinan

s-o Poncet, membro de T. E. K. A. kaj I. S. A., en la Esperanto Officejo, 36 rue Victor Hugo, Lyon.

Esperanto ĉe natursciencistoj.

La naturscienca „Société Linnéenne de Lyon“ kalkulas pli ol 500 membrojn en plej diversaj landoj de l' tuta mondo, kaj baldaŭ festos sian centjarian jubileon. Ĝi akceptas uzi Esperanton por faciligi la intersanĝojn kaj la korespondadon. Ĝi sendas al ĉiuj siaj membroj duonmonatan bul-tonon (en kiu petoj kaj proponoj pri intersanĝoj de natursciencistoj povas esti senpage presataj en Esperanto) kaj jaran volumon, kiu enhavas plej diversajn studojn pri floroj, fungoj, insektoj, papilioj, konkoj, mineraloj k. a. Kofizoj (10 fr. fk.) kaj informpetoj estu adresataj al s-ino Farges, del. UEA, 36 rue Victor Hugo, Lyon.

(Linné estas fama sveda natursciencisto de la 18-a jarcento, aŭtoro de botanika klasifiko.)

Al la artikolo elemento-Teorio (ET n-o 71).

En la tria parto de mia artikolo mi provis formuli laŭ la esprimmaniero de la elementoteorio la opinion de s-o prof. Grosjean-Maupin, esprimitan en lia artikolo de la 1. jan. Mi skribis: La opinio de s-o G.-M. tekstus: „... la interelementa rilato (de finaĵoj) do neniam bezonas sekvi analogiajn.“

S-o prof. G.-M. bonvolis komuniki al mi, ke mi ne tute ĝuste interpretis lian penson kaj ke li neniam diris nek intencis diri, ke la interelementa rilato ĉiujfoje sen escepto estas libera aŭ ke ĝi ne bezonas sekvi la analogiajn. Estante lingvosciencisto, s-o G.-M. ne povas malatenti la analogiajn. Tial li, same kiel mi mem, opinias, ke la plej korekta esprimo ekzemple por igi abstrakta estas abstraktigi (s-o G.-M. eĉ same skribas pri korektigi kaj falsigi). En sia artikolo li volis nur diri, ke ankaŭ la formo abstrakt-i en tiu senco ne estas kondamninda sed estas „tolerinda aŭ almenaŭ tolerebla“.

Rekomendante tian toleron, li ĉefe celis komprenigi kaj pravigi la sencan, kiun Zamenhof kun ŝajna kontraŭlogikeco donas al la vortoj korekt-a, fiks-a, fals-a. Ĉar la radikoj, laŭ la fikso (s-o G.-M. skribas: „konstanta opinio“) de Zamenhof, estas verbaj, la derivaĵoj teorie kaj laŭlogike devus samsignifi kun korekt-iga, fiks-iga, fals-iga. Ĉi tiu noto estas kontrolita de s-o G.-M.

Eugen Wülster.

## Ni estu praktikaj!

(Komparu la artikolon „Esp. kursoj inter militistoj en n-o 74.)

Esperanto komencas eniri praktikan periodon. Ni do nun devas propagandi Esperanton laŭ praktika vidpunkto, forlasante la internan ideon je la dua plano. „Ni devas disvastigi la scion de nia lingvo, ne nur la ideon“, diras prave „Esperanta Finnlando“.

Propagandi Esperanton inter militistoj kun la ideo, ke ili fariĝos pacifistoj (tamen, s-o Pr. konscias, ke la permeso estis donita nur pro praktikaj celoj) same ne konvenas, kiel skribi al foira direktoro: „Kara samideano“, paroli pri la interna ideo al komerca ĉambro aŭ diri al naci-isto, ke Esperanto estas forta helpilo de la Internacia proletario.

Propagandante en diversaj medioj, ni serĉu unue argumentojn, kiuj povas interesi ilin. Ni estu praktikuloj kaj realistoj!

Alo, Paris.

## Katolikaro.

Internacia laborkongreso katolika en Luksemburgo.

Laŭ informo de Ika (Graz, Karmeliterplatz, Aŭstrujo) okazos la 2-a Internacia Laborkongreso Katolika de 31. julio ĝis 3. aŭgusto 1922 en Luksemburgo. Detalajn informojn donas la Centra Officejo de Ika

Kreti kuris al Pleti, kiu ree siaris apud la vilaĝa puto: „Ĉu vi jam scias?“

Pleti: Ha jes. Terura fakto!

Kreti: Kio pelis sin en la morton?

Pleti: Kiu scias?

Kreti: Eble la babilado pri ŝia knabeto.

Pleti: Mi ne kredas tion: neniu ja pruvas, ke ŝi mortigis sian infanon.

Kreti: Jes, neniu!

Pleti: Nu do! Cetere babilado pri aliaj homoj ne estas mia kutimo. Adiaŭ! Mi devas rapidi hejmen. Mi havas laboron, multe da laboro! (Ŝi lasas stari Kreti-on kaj forkuras ne salutante.)

## Vi kaj mi.

Mi nun rememoras... Ni kune vivis jam Antaŭ miljaroj sur egipta ter'... Vin riĉe ornamis la pomp', la glori' kaj fam Min — nur ĉifonoj grizaj de l' mizer'... Princino belega de l' faraono — vi: Sub baldaken' sidanta sorĉa rav'... La plumventumilon tenanta knabo — mi Via silente vin amanta sklav'...

La tempo revenis laŭ volo de l' destin', Kaj nin disigas mejloj cent kaj cent; Sed saman turmenton en koro, ho knabin', Eĉ nun mi portas ĝeme en silent'... Kaj ĉio la sama... De mi — la larm', dolor' De vi — la ĉarma porĉiama rav'... Vi restis belega princin' de mia kor' Kaj mi — silente vin amanta sklav'.

Julio Baghy, Budapeŝt.

DISVASTIGU ET!

## Komerco.

### Okazontaj Foiroj.

- 2.—8. aprilo Printempa Foiro Frankfurt a. M.
- 3.—19. aprilo Komerca Foiro Bruxelles.
- 12.—27. aprilo Printempa Specimena Foiro Milano.
- 14. aprilo ĝis 16. majo Ekspozicio-Foiro Alger.
- 22. aprilo ĝis 2. majo Sviza Specimena Foiro Basel.

## Kongresdato de la Dekkvara ŝanĝita.

De la Loka Kongresa Komitato atingis nin, tuj post ekspedo de nia antaŭa numero, telegramo de 24. marto kun jena teksto: „Ŝipiroj ŝanĝitaj. Kongresdato oka-deksesita.“

Tio signifas, ke — pro ŝanĝo de la ŝipiroj — la kongreso povos okazi nur de 8.—16. aŭg. Ni petas ĉiujn kongresantojn atenti tiun ŝanĝon.

Al la Dekkvara aliĝis ĝis nun 230 personoj el 20 landoj, kaj 9 helpkongresanoj.

## Skoltismo.

### Skolta Esperantista Ligo.

Lastatempe interesa kaj tre kuraĝigaj informoj alvenis al ni el Ameriko.

S-o Ward Nichols, sekr. de Committee on International Auxiliary Language (Komitato pri Internacia Helpa Lingvo) de International Research Council (Internacia Esplora Konsilantaro) mem estas Esperantisto kaj energie laboras por nia afero.

En longa interesplena letero al ni li priskribas sian lastatempnan aktivecon.

Ce kunveno de la skoltaj estroj de Kolumbio, prezidata de ĵugisto Thompson, li preparis la skolto-Esperanto-movadon. Ankaŭ parolis d-ro F. G. Coitrell, prezidanto de la Komitato pri Internacia Helpa Lingvo. Tiu sinjoro pasigis grandan parton de la lasta jaro en Eŭropo por studi la problemon de internacia helplingvo. Li ĉeestis la Pragan kongreson, la kunsidon de la Ligo de Nacioj kaj la ĉiujaran konferencon de la Brita Asocio. Li intervjuis ĉiun, kiu rilatas la aferon, de Lia Moŝto Lord Robert Cecil ĝis la propagandafakestro de SEL. Aparte de lia lingva laboro li estas bonekonata fizikisto.

S-o Ward Nichols instruas klason el trupo n-o 39, lokita en la meza kvartalo de Washington. Unu el liaj lernantoj estas trupestro d-ro C. Wythe Cooke (de la Usona Geologia Societo) kaj alia estas la filo de ministro de Guatemala (Bianchi).

Leginte mian artikolon en „Esperanto Triumfonta“ de 8. jan., li tuj ĝin tradukiis kaj sendis, kune kun la ĵurnalo, al la ĉefuloj de la skolta movado de sia distrikto kaj ricevis respondon, ke ili intencas pritrakti la tutan aferon kun s-o Baden Powell.

Ili intencas pridiskuti la aferon ankaŭ ĉe la ĵulia „Malferma kunsido“ de la Skoltaj Ĉefuloj de la Mondo, okazonta en Parizo.

Geskoltoj, eksgeskoltoj, anĝu tuj al via propra, vigla, energia Ligo. Helpu al ni atingi niajn kaj viajn celojn. Tuj vin turnu al la honora ĝenerala sekretario, trupestro Norman Booth, Netherton, Huddersfield, Yorkshire, Anglujo.

J. W. Leslie,

Propaganda Faktestro de S. E. L.

## Vegetaranoj!

Al la vegetaraj Esperantistoj en la tuta mondo.

En la nordaj landoj Sveda, Norvega, Dana kaj Finna vegetaranoj parolantaj Esperanton fondis korespondan klubon nomitan „La Gefratbando“. La klubo, kiu nun konsistas el anoj de supre nomitaj landoj, havas en sia programo la frazon: „Per Esperanto kaj vegetarismo ni povas fondi internacian vegetaran unuigon de korespondado.“

Nun ni invitas ĉiujn vegetarajn Esperantistojn en la tuta mondo skribi al subskribinto pro membreco kaj ni sendos poste membroliston. La kotizo estas 2 sved. kr., kiun sendu post nia respondo.

Por „La Gefratbando“: Ante L:son Antee, Sysseback, Sved.

## Letero

### de brita samideano de la Leipziga Foiro.

La urbo estas plenplena je homoj. Ĉie okazas kunpuŝigoj, kaj longaj vicoj de atendantoj etaras en la poŝtofocejo, ĉe la teatra kaso, antaŭ la pordoj de la bonaj kafejoj kaj restoracioj. Ĉiuj taksametroj kaj fiakroj estas menditaj; ili staras, la flagetojn malsupren. Supozeble ankaŭ Esperantistoj troviĝas en tiu granda amaso de diversnaciaj homoj. Oni raportas 140000 vizitantojn.

Tuj post elvagoniĝo enirante tramon, mi ekvidas verdan stelon en la butonruo de juna homo. Mi alpaŝas, salutas kaj faras demandon, sed ho ve! li respondas: „Mi ne perfekta Esperantisto!“ Tio memorigas min pri la Parisa bulvardaj butikoj, kiuj elpendas ŝildojn „English spoken“ („Ĉi tie oni parolas angle“), sed interne neniu ĝin parolas. Mi konsolas min en la posttaĝo antaŭ la ĉefa poŝtofocejo, kiam iu homo, ekvidante mian stelon, alparolas min en bona Esperanto. Tiu lasta ne portis stelon; kial?

Ankaŭ en la Esperanta kunveno estas manko de loko. „Estas la foira influo!“ klarigas sinkulpige d-ro Dietherle. La Esperantistoj havas la reputacion ĉe la ekstera mondo de freŝaer-amantoj, senĉapeluloj ktp.-uloj. Oni bedaŭris dum tiu kunveno, ke tio ne estas vera fakto. La bonhumora atmosfero en la ĉambro estis dika, varmega kaj premanta. Parisa samideano vigle penas rakonti pri la mirakloj de kongresvojaĝo kaj aliaj ekscitigaj okazintaĵoj. Li ŝvitas, ni ĉiuj ŝvitas, kaj la fenestroj estas fermitaj, kvazaŭ la familia rondo estas jaluza pri siaj sekretoj, kiuj ne devas elflugi en la eksteran mondon ŝanĝe de bona aero, kiun oni povus ricevi.

Niaj Leipziga samideanoj tamen estas gratulindaj pro la bona propaganda laboro farita. En la foirĵurnalo mi legis en Esperanto la inviton al la eksterlandaj Esperantistoj por la kunveno. Sur la grandaj afiŝoj pri la diversnaciaj renkontiĝoj oni povis ankaŭ legi en Esperanto pri la renkontiĝo de la Esperantistoj. La foiraj aŭtoritatoj oficiale rekonis Esperanton kaj pagas apartan Esp. ofician, kiu bone prizorgas la foir-Esperantan flankon, kaj la Esperantistaj vizitantoj devas esti dankaj al ĉiuj pro la bonaj servoj faritaj al ili kaj samtempe al la foiro.

J. D. A.

## Grandanima Donaco.

Por rusaj malsatantoj ni ricevis ĉekon je 21518 germ. mk. de Esperanto Service Corporation en New York. En nia venonta numero ni parolos pli detale pri tiu afero.

Krome ni ricevis ĝis nun jenajn donacojn por rusoj malsatantoj:

Grupo Marseille 20 fr. fk. — S-o Bonnevie, Kristiania 5 norv. kr. — S-ino Mammen, Grenaa 5 dan. kr. — S-o Jönssen, Hällefors 5 sved. kr. — Ges-oj Bünemann, Hamburg 100 gmk. — S-o Kawecki, Danzig 50 gmk. — Kolekto de s-o Ed. Bellin, Montreux 10 sv. fk. — S-o Schaafsma, Beverwyk 10 hfl. — S-o Kothe, Oppeln 3 gmk. — S-o Fern. La Gravière, Antwerpen 10 bfk.

## Esp. Centra Oficejo.

La oficistaro de la Esp. Centra Oficejo konsistas nun el la solaj jenaj personoj, kiuj dediĉas tempon al la Oficejo, ekstere de siaj profesiaj okupoj:

S-oj-Gabriel Chavel, ĝenerala sekretario de la K. K. K., barono F. de Méné, ĉefadministranto, kaj Leono Agourline (ĝenerala propagando); f-inoj G. Gérard kaj Ch. Gaillot (administraciaj laboroj).

Por faciligi kaj rapidigi la laboron, oni bonvolu adresi ĉiujn sendaĵojn laŭ la jena maniero: Esperantista Centra Oficejo, 51, Rue de Clichy, Paris-9<sup>e</sup>.

La monsendojn oni adresu al la persona nomo de s-o F. de Méné, aŭ lia poŝta ĉekkonto: Paris, 1<sup>er</sup> Arrondissement C. C. 8-60.

## Naciaj Esp. Kongresoj.

Pri la kongreso de francaj Esperantistoj en Béziers (Hérault), 3.—5. junio 1922.

Konkurso kun monpremio okazos por gekongresanoj ankoraŭ ne 20-jaraj. Taskoj estas: 1. Skribparto: Francigo de teksto Esperante diktita; Esperantigo de franca teksto. — 2. Parolparto: Apliko de gramatikaj reguloj Esperante klarigitaj; Esperanta rakonto pri la vivo de d-ro L. L. Zamenhof aŭ pri la historio de Esperanto.

Estas donitaj du premioj: I-a de 350 kaj II-a de 250 frankoj. La estro de la firmo Mercerie „A l'Esperanto“ bonvolis doni 200 fk. kiel pruvon de danko al Roksano, kiu faris al li servon; kaj por plialtigi la valoron de la I-a premio, la geanoj de „Beziersa Stelo“ oferis 150 fk. el la 300 fk. al ili promesitaj kiel rekompenco. — La II-an premion de 250 fk. donis la konata aviadisto Henriko Farman.

Inter la fakaj kunvenoj ni citas tiun de la framasonoj. Sin turni al s-o Méras, 11 rue Poussin, Paris-Auteuil (16) por enskribo, kaj sendu unu frankon por ricevi sciigojn pri de li preparata kunveno de la Loĝioj en Beziers.

Pri la grupo „Konkordo“ fondata de d-ro Leono Zamenhof sin turni al Roksano, 111, ave. G. Clémenceau, Béziers.

XI-a Germana Esp. Kongreso en Breslau (3.—6. junio 1922).

El la 7-a komuniko ni scias, ke anoncojn por la Esp. ekzamenoj en Breslau oni sendu al s-o prof. Dietherle, Leipzig-Schl., Seumestr. 10, ĝis 20. majo. — Kongreskotizon de 30 gmk. (por pluj samfamilianoj 25 gmk.) oni sendu al s-o Habelok, poŝtĉeka konto Breslau I, 13987. — Adreso de la sekretario: Hanuschke, Breslau 9, Hedwigstr. 11.

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista havas la II-an laborkunsidon de centrobohemiaj Esperantistoj en Kladno (1. kaj 2. aprilo).

VIII-a Kongreso de Finlandaj Esperantistoj okazis la 25-an kaj 26-an de marto en la malnova Studenta Domo en Helsinki.

Kongreso de Skota Federacio okazos la 10. junio en Aberdeen. Adreso: F-ino A. G. Mac Farlane, 234 Dumbarton Road, Partick.

X-a Kongreso de Kataluna Esp. Federacio okazos en Manresa en printempo 1923, anstataŭ en aŭtuno 1922.

## Por „Esperanta Ligilo“

alvenis pluaj donacoj:

204. Wl. Pfeiffer, Lodz (Kolekto de Pola Esp. Soc.) 320 gmk. (5248 pmk.) — 205. Kolekto ĉe festa kunveno de Esp. Grupo Offenbach a. M., sendita de M. Urban, Frankfurt 46 gmk. — 206. Maria Hochsteiner, Stuttgart 20 gmk. — 207. J. J. van Wensveen, Wormerveer 1,25 hfl. — 208. Anonimulo 3 kē. — 209. R. G. Heinhuis, Wormerveer 0,50 hfl. — 210. Tom A. Allan, Montreal 2 dol. — 211. Luciano Cattorini, Milano 5 gmk. — 212. E. Janicki, Kaunas (Lit.) 21 gmk. — 213. Ekl. Kons. Becker, Breslau 13,50 gmk. — 214. Prelato A. Dombrovski, Kaunas 100 gmk. — 215. Fernando Zacché (Esp. Grupo Mantova) 5 liroj. — 216. Stan. Rymkiewicz, Poznan 1500 pmk. — 217. G. van Heek, Hengelo 7 hfl.

## Mallongaj Esp. Sciigoj.

La Komerca Alternejo de Nürnberg (Germ.) anoncas en la ĵus aperinta listo de la prelegoj por somero ree du prelegojn pri Esperanto. Krom enkonduka prelego okazos seminarioj ekzercadoj por progresintoj. Gvidonto prof. d-ro Ledermann.

### Esp. kiosko ĉe Lyonsa Printempa Foiro

estis afable donita de la administracio kaj organizita de s-ino Farges. 5000 propagandiloj disdonitaj, kelkcentoj da lernolibroj venditaj.

### Grupo „Harmonio“ en Miskolecz (Hung.)

malfermis 5 kursojn, kies gvidantoj estas s-o prof. Ludoviko König, s-ino d-rino Jolan Gozon-Fodor, f-ino Aranka Lichtmann kaj s-o Sandor Weisz.

### Danlando.

S-ino Magda Mammen gajnis urbkonsilanton s-on Jens Alby, Bredgade, Grenaa, por studado de Esperanto, konvinkante lin, ke Esperanto estas influa ilo por disvastigi socialajn ideojn. Gesamideanoj ĉiulandaj estas petataj skribi al li.

Dum jubilea festo de danaj virinoj (27. febr.) s-ino Mammen paroladis pri Esperanto ĉe internaciaj virinaj kongresoj. Samideaninoj estas petataj skribi al la prez. de la virina societo en Grenaa, s-ino Dyekjar, Storegade, kiu estas sola virina membro de la urba konsilantaro.

### Germanlando.

Kursoj komenciĝis en Dohna (45 p.), Gerungen (16 p.), Königsberg (en gimnazio), Mannheim (unu por sportistoj, alia por policianoj), Waldshut a. Rejno (12 p.), Zitzschewig-Dresden (26 p.).

### En Danzig

s-o Amort faris la 20. marto paroladon antaŭ 50 membroj de katolika junula unuigo St. Josef. 30 p. decidis eklerni Esperanton. Tial la vicprez. s-o instr. Mlynski vizitis la kurson de s-o Amort en urba gimnazio. La saman tagon ankaŭ s-o Aeltermann faris paroladon en katolika junula unuigo en Langfuhr kun simila bona sukceso.

### Franclando.

En la liceo de St. Omer okazis la 16. marto festo de la Licea Esp. grupo. La fondinto, prof. Deligny, parolis pri la kongreso, kun lumbildo. — En la Laborborso en Paris s-o Gabory gvidas kurson kun 20 p.

### En Bilbao (Hisp.).

kie antaŭ la milito estis vigla Esp. movado (oni havis belan ejon, ricevis jaran subvencion de la urba komunumo kaj eldonis gazeton „Nova Sento“), kaj kie en la lastaj jaroj la propagando estis malforta pro manko de elo, la Esp. vivo nun denove ekfloras. Oportuna grupejo estas trovita (str. Merced n-o 11), okaze de kies inaŭguraĵo paroladis la prez. s-o Diez kaj s-o Larrea kaj poste okazis festeno kun kantoj ktp. Du kursoj, gvidataj de lertaj instruistoj kaj ĉeestataj de ĉ. 70 lernantoj, esperigas bonan rikolton. La gazeto „Hispana Esperantisto“ kaj „Esperanto Triumfonta“ estas venjataj en publika ĵurnalo-vendejo. (Laŭ raporto de „Grizhara“.)

### Pollando.

En Ruda-Pabjanicka s-o Fr. Dolka gvidas kurson kun 13 p. — En Kozulski s-o E. Germand kaj J. Sudelik organizas filion de Pola Esp. Soc.; s-o Sudelik faras propagandon inter fervojaj oficistoj, el kiuj multaj jam Esperantistiĝis.

### En Salzburg (Aŭstrio)

fondiĝis la 22. marto „Laborista Esperanto Asocio, Grupo Salzburg“.

## Korektoj.

S-o Wernicke en Stendal sciigas nin, ke en ET n-o 76 sub „Vivoflozofiaj instruoj“ troviĝas unu, sub kiu staras la nomo de l' greko Platon; la verkinto estis Horatius (deka odo de l' dua odolibro).

En nia sciigo pri festeno de Berlina Esp. Gruparo (n-o 77) ni forgesis la nomon de s-o patent-advokato Ludwig Schiff, je kies honoro okazis la festeno.

## Nekrologio.

Lasthore ni ekscias, ke sinjorino Sébert, edzino de nia atestimata generalo Sébert, mortis en Paris la 27. marto. En ĉi tiu dolora cirkonstanco ni prezentas al generalo Sébert niajn plej sincerajn kondolencojn.

Subite mortis en Zilina, Ĉeĥoslovakio, nia samideano kaj abonanto de ET, s-o Vojtech Adler, kuratoro de la okulsanigejo en Zilina. Al la funebra vidvino ni kondolencas simpatie.

En Monaco mortis s-o Giovanni Pedrazzini, patro de nia fervora s-ano Stefano P., ĵus ek-migrinta al Meksika lando. La mortinto ne estis Esperantisto, sed ĉiam favore rigardis nian movadon kaj subtenis ĝin. Dum multaj jaroj li estis urbestro de Locarno kaj depulito ĉe la Tiĉina parlamento. Lia ĉerko estis transportata al Locarno. La Esp. grupo oficiale partoprenis je la funebra ceremonio, portante Esp. flagon. (C. O.)

## Recenzejo.

### LIBROJ.

LA EKSPERIMENTO DE ECCLES. Kun notoj pri la instruado, de Elizabeth Hogg. 24 pg. 12½ x 18½ cm. Brita Esp. Asocio, London. Prezo 10 p. aŭ 4 resp. kup.

En tempo, en kiu pro la Ĝeneva konferenco la Esperantista mondo pli ol iam okupigas pri instruado, la libreto povas pretendi specialan atenton. Ĉie ĉi instruanto povas multon lerni el ĝi, kvankam mi — de 13 jaroj instruante — ne ĉiel povas konsenti kun la metodo de E. H. Sed certe ĝi bone aperis, kaj kapableco de instruanto estas pli grava ol teoria metodo. Sed ĉu oni fakte tedu infanojn per kritika studado de „Hamlet“ ktp.? Ĉu la simplaj frazoj el la Fundamenta ekzercaro, aŭ „Unua legolibro“, aŭ „Sub la neĝo“ ne estus preferindaj por infanoj? (H H)

TRI ANĜLOJ ALILANDE. Romano originale verkita en Esperanto de John Merchant. Dua eldono, 1922. B. E. A. Publications Fund n-o 8. 62 pg. 12 x 18 cm. Eldonis Brita Esp. Asocio, London W C 1, 17 Hart-Street. Prezo: broŝur. 1 s. 1 p. aŭ 5 resp. kup.

Originala verko en Esperanto valoras pli multe ol dek tradukoj, ĉe se ili estas bonegaj, ĉar speciala lingva spirito evidentigas la esencon de lingvo vivanta. Tia estas Esperanto. La romano (aŭ pli ĝuste la rakonto, noveleto) de samideano Merchant montras tiun spiriton ĉiutagane. Tre gaja kaj gailga estas la enhavo. Spiritaj koboldoj ridigas kaj amuzas la leganton; delikata ĉarmo kaj natura bonhumoro dispruigas multokolorajn falreojn. Komikaj situacioj alternas kun surprizaj momentoj, kaj la harmonio forĝas brilaĵojn ĉenerojn formanta oran ringon. Fino bona, ĉio bona. — Mi vere pasigis tre agrablajn horojn tralegante la gajan romaneton. Pri la temo mem mi nenion diras, por ke mi ne forrabu al la legonto la plej bonon. Sed mi rajtas aserti, ke la aŭtoro estas tre lerta kaj lingvosperta verkisto, kies rakonto estas salutinda plirikiĝo de nia literaturo. — Lingvo kaj stilo estas laŭdindaj; prezerarojn mi ne trovus. Esperable s-ro Merchant naskos refoje ion similan kaj uiligos alian talenton donacante al ni pluan originalaĵon. — Mi nepre rekomendas la beletan libron al la ĝuemaĵ gelegemuloj. (G. Ajul.)

## Genève.

N. Barthelmess.

Printempo vokas, la fortulo, Li puŝas, premas, pelas nin. Infektas ĉiun lia brulo. Varmega blovo ankaŭ vin.

Ho, ne haltigu la spirojn En via brusi disvolvigemajn, Elliberigu sankt-inspirojn, Elmortu revojn kaŝe-tremajn!

Al cel' konduku ilin grava, Realigebla, atinginda.

Kaj pruvu, ke vi estas prava, Ne sekvas vian vojon blinda.

Pli dolĉe blovas mildaj ventoj, Se altan vokon ni obeas; Pli ĝoje viglas niaj sentoj, Se ni valorajn bonojn kreas.

Printemp' invitas al Ĝenevo: Ho, estu ĉiuj pretaj ĝi! Ne mankas for' al nia revo, — Realiganta estu ĝi!

Forjetu aĉajn bagatelojn, Samideanoj de l' Espero! Forpuŝu ameliajn stelojn, Memoru pri la ĉefafero!

Malzorgu amajn aventurojn, Prokrastu la scienclaboron, Rezignu de l' kutim' plezurojn, Memoru nian gravan honoron!

Koncentre agu, kolegaro, Senlacaĵ vidu nin la tago! Printempo vokas nin por faro, Por glora, celkonscia ago!

## Peto al niaj abonantoj.

Por ebligi ĉiam precizan ekspedon de ET, ni intencas, en estonta tempo presigi la adresojn sur la banderoloj. Ni tial petegas niajn abonantojn, sciigi nin, se iu adreso ĝis nun ne estis tute korekta, aŭ se ĝi enhavis superfluaĵojn. Ĉar aliĝo aŭ ŝanĝo de adresoj necesigas novan matricon, ni devas en estonta tempo kaze de adres-aliĝoj kalkuli la prezon de tri numeroj de ET. Tial ni petas pri tuj respondo.

Administracio de ET.

## Pension-Hôtel Richemont Montreux (Svisl.)

Belega situacio. — Komfortaj ĉambroj. Moderaj prezoj.

Sin rekomendas al turistoj kaj vizitantoj de Montreux.

Partoprenontoj ĉe la Esperantista Konferenco en Genève,

ne forgesu dum vojaĝo viziti la perlon de la Lago Lemano!

Informojn donas la Bureau Officiel de Renseignements, Grand' Rue 83.

# Nederlanda Esperanta Komerc-Oficejo

(Nederlandsch Esperanto - Handelsbureau) Diergaardelaan 64, Rotterdam (Hollando)

Tradukas cirkulerojn, komercajn leterojn ktp. el Esperanto en nederlandan lingvon, kaj sin ŝarĝas per la dissendo de cirkuleroj.  
Prizorgas la anoncadon en Nederlando.  
Interrilatiĝas kun nederlandaj komercistoj kaj industriistoj.  
Sciigas la kurzojn de valutoj kaj valorpapiroj.

## Al vendistoj de Ĉefĉiflosiloj kaj similaj Esperantaj ŝlosiloj.

Mi deziras sendi estontajn eldonojn de BES-adresaro ankaŭ al neesperantistoj, por ke ili disvastigu Esperanton inter ili.  
Ĉar BES-adresaro (4-a aŭ 5-a eldono) estos sendota al Francio, Nederlando, Italio, Hispanio kaj ĝiaj kolonioj kaj ankaŭ Centra kaj Suda Ameriko, mi bezonas precipe ŝlosilojn Esp. en franca, angla, holanda, hispana kaj itala lingvoj (post kelka tempo en ĉiuj lingvoj!), kiujn mi sendos senpage kun nacilingva flugfolio pri BES-adresaro al aĉetantoj de BES-adresaro.  
Bonvolu sendi al mi proponojn kun favoraj kondiĉoj; sendu al mi po unu specimeno kaj informu min pri via provizo.

Samideane

K. Jelínek  
Nitranská ulice 6  
Praha - Král. Vinohrady  
Ĉeĥoslovakio.

## SENNACIECA REVUO

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Ilustrita, dekases-dudekpaĝa gazeto, redaktata tute en Esperanto, pri ĉiuj temoj interesaj por la proletaria Esperantistaro.

Estas devo kaj samtempa profito por ĉiu klas-konscia Esp. proletario aboni tiun belaspektan kaj valoran revuon.

Aperas monate.

Redakcio: 24 Boulevard Beaumarchais, Paris XI.

Administracio: 177 Rue de Bagnolet, Paris XX.

(Specimeno havebla interŝanĝe de 2 resp.-kuponoj aŭ alio samvalora.)

## Anoncetoj.

Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 20 vortoj 0.20 dol., 0.50 fl., 1 nord. kr., 1 ŝil., 1 ŝv. fl., 1 pes., 2 franc., 40 belg. fl., 5 lir., 7 fmk., 8 kc., 25 gmk., 60 hung. kr., 250 pmk., 250 aŭstr. kr., internacie 5 stamp. resp.-kup.; ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la pagon por anoncetoj laŭdezire de la abonanto, de aliaj ni enpresas anoncetojn nur post antaŭpago. — Anoncetoj devas alveni 10 tagojn antaŭ publikigo.

EKSPONIZIO de la XIV-a bezonas diversajn ekspoziciindajn Esperantistojn. Sendu donace (pretere) aŭ prunte al XIV-a Universala Kongreso de Esperanto, Helsinko.

DISERVO ESPERANTA okazos en St. George's Church, Hart Street, London W. C. 1, je dimanĉo, 9. aprilo, 5.15 h. pm.

APERIS LIBRO „La malbonaj flankoj de sporto“: 1 ekzemplero kostas afrankite 0.75 fr. aŭ belg. fl., 0.50 sv. fl., 1.25 li. lir., 3.50 kc., 0.25 ŝved. kr. — Mendo ĉe J. Vahikeri, Postkontor, tuba 15, Tallinn, Estonio.

KURSO DE ESPERANTO POR GERMANOJ. Kolekto de „La Esperantisto“, n-o 2. (Einführung in die Völker-sprache Esperanto in 10 Stunden.) Prezo 8 gmk. aŭ 1 kc. Havebla ĉe la administracio de „La Esperantisto“ en Wien II, Postamt 24.

FIDELECO KAJ ESPER. Himno pri fideleco al Esperanto. Prezo: kanto kaj forteplano 1 fr. fl. Havebla ĉe l' aŭtoro: S. Frantz, 21, Rue Alain-Chartier, Paris.

PROGRESEMAJ EDUKISTOJ kaj interesataj samidealaj ne-dukistoj, abonu vian revuon „NOVAJ TEMPOJ“! Pri- traktas edukajn aferojn, propagandas pacemajn progres- emajn ideojn, celas la pristudon de racia edukada sistemo. Monata, Esperante redaktata. Jarabonprezo 6 fr. fl. (mal- aliigita por nacioj kun malbona valuto). Petu specimenojn. Sin turni al: Vittecoq, Sassetot par Bacqueville (Seine Inférieure), Franclando.

PETO. Malriĉa? studento petas bonkorajn samideanojn (bonvalutlandanojn) je konsultado por kongresa vojaĝo al la XIV-a. Sinceran dankon jam nun. Oni skribu al: Pola Esperanto Societo, Poznan, Polujo, Wjazdowa 10, I.

PUBLIKA AVERTO. La administracio de ET avertas pri s-o Varo Jovčev en Gabrovo, Kaŝtite, Bulgario. Li mendis ET kaj akceptis ĝin dum tuta jaro, sed ne pagis. Ni avertas ĉiujn samideanojn, ke ili nenion liveru al la nomita sinjoro, se li ne antaŭe pagis.

SIGELMARKOJN Esperantajn, insignojn, kaŭĉukajn stamp- ilojn por societoj, poŝtkartojn liveras tuj Jozefo Kocotrek, gravuristo, Wien X, Arthaberplatz 3-14. Oni kores- pondas en lingvoj: ĉeĥa, germana, rusa kaj Esperanta. Postulu specimenojn de Esperantaj sigelmorkoj kontraŭ 2 respond-kuponoj.



## 6-an Internacian Foiron de Frankfurto a. M. 2.—8. Aprilo 1922

30 Komercujo-grupoj en sole unu tereno!

Prospektoj en 14 lingvoj kaj en Esperanto.

Aŭtuna foiro 8.—14. Oktobro 1922.

Petu detalojn kaj informojn de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a. M.

## Esperantiganto por la perslingvaj Bahaj-skribaĵoj

tuj serĉata. Proponoj kaj provoj petataj de Hans Böning, Stuttgart, Germanl. Libanonstrato 45

## Art-Amikoj,

Artaĵo-, Bildo- kaj Libro-Vendistoj, kiuj havas intereson por belegaj akvaretoj, oleopentraĵoj ktp. de eminentaj kaj konataj pentristoj aŭstria, turnu sin al Sepp Osterer, Graz, Aŭstrio, Gleisdorfergasse 5. Malaltaj prezoj.

## Komercu kun Britlando.

Se vi volas aĉeti ion el Britlando, mi volonte helpos vin. Mi reprezentas grandajn fabrikelojn ĉiuspecajn. I. a.:

## ĈEMIZOJ.

Harry Heslop, komerca agente, Orrell House, Fairfield, Bury, Lanc.

## La Interŝanĝo

Franca kaj Esperanta revuo ilustrita por korespondantoj, interŝanĝoj kaj komercaj interrilatoj aperas sep fojojn jare, estas 32- aŭ 40-paĝa, ne enkalkulante la liston de la aliĝantoj sendatan nur al la abonintoj.

Jara abonprezo: 10 francaj frankoj. Specimena n-o: 1 franca franko aŭ 4 respond-kuponoj.

A. Bonnefous, Direktoro, Béziers (Hérault), Francujo, 3, rue du Capus, et 22, rue Viennet.

## Al ĉiuj samideanoj de Sovjeta Rusio, Ukrainio kaj Siberio!

Vi certe volas havi rilatojn kun tuta mondo. En majo aperos la 4-a eldono de la mondkonata BES-adresaro de Esperantistoj, kiu kostas sv. fl. 1.50 kun senpage enskribo por la proksima eldono. Anstataŭ ĉiuj sv. fl. 1.50 sendu al mi 75 uzitajn poŝtmarkojn de Sovjet-Rusio, Ukrainio aŭ Siberio eldonitajn dum 1918—1922. (La poŝtmarkoj devas esti sendefektaj, se eble, sur peco de originala koverto aŭ poŝtkarto.) Al personoj en supre nomitaj landoj por ĉiuj menditaj 10 adresaroj mi donos 50 poŝtpaperojn Esperantajn kaj kovertojn.

Eblan gajnon (se estos) je pm. ricevita el mendoj de supre nomitaj landoj mi uzos por reklamo de BES-adresaro en landoj, kie Esperanto ĝis nun ne vivas, kiel Liberio ktp. (Anonproponoj de iu Liberia gazeto mi jam ricevis.)

Eldonistoj de Esp. gazetoj en supraj landoj bonvolu sendi specimenojn de viaj gazetoj kaj anonproponojn!

Adresu ĉion al K. Jelinek, Nitranská ulice 6, Vinohrady, Ĉeĥoslovakio.

PS. Ĉi tiu propono validas nur por mendoj forsendotaj antaŭ 15. junio 1922. Ankoraŭ kelkaj ekzempleroj de la 3-a eldono de BES-adresaro estas haveblaj.

## Komercista Esperanto Grupo

Hauptstr. 38 Dresden Hauptstr. 38

peras ĉiujn komercajn rilatojn! Plej rapida! En unu monato ni faris 66 servojn! Plenumo per speciale dungita oficisto!

Nia sidejo estas meze en la plej industrihava parto de Saksujo!

### Specialaĵoj:

maŝinoj, elektraj aĵoj, gramofonoj, pianoj, ĥem- aĵoj, sapoj, parfumo, ludiloj, kontorartikloj, art-objektoj por ĉambro-instalajo, optikaj iloj, foto- artikloj.

Ni serĉas por nova fondota fabriko por libroj (nebindita folio-sistemo) kapital-partoprenanton kun

**300 000 Markoj.**

Bona rentumo kaj bona garantio estos donataj!

PASTRO L. W. CRONKHITE, post kvardekjara laboro, eka- lĝos sian mislan laborkampon ĉe Bassein, Burma, en frua aprilo, por reiri al sia usona hejmo. Nova adreso: Greenwich, N. Y., U. S. A., kien li alvenos ĉirkaŭ la unua de junio. Li aparte bonvenos leterojn kaj poŝtkartojn ilustritajn montrantajn gefananojn. Responde li sendos leterojn kaj Burmajn kaj Hinduajn kartojn.

ESPERANTAJ INFANOMOJ. En junio ni atendas nian unue-naskitajn infanojn. Kiu scias verajn Esp. antaŭ- nomojn, bonvolu sciigi ilin al subskribinto. La mallongigo devas esti facile elparolebla. Dankos s-o A. A. Suerink, Plaivoet 96, Diepenveen, Nederl.

ARTAJ INSIGNOJ. „Agrable surprizita pri ilia ĉarma aspekto, s-o Poncet, vic-ĉefdel. de UEA en Lyon, varme rekomendas la artajn insignojn de f-ino Gérard, 9 rue d'Armaille, Paris 17.“

## Korespondo kaj Interŝanĝo.

Mi vendas papermonon de Kolĉak. Pago per respond- kuponoj. Skribu al Nikolao Ivanov, 110, Puŝkinskaja, Barnaul, Siberio.

Eero Kakkonen, Karisalmi st., Finnlando, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustr. (bfl.), leterojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

Deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj (artaj) kun ĉiuj landoj (precipe kun eksterropaj) f-ino Ada Freundlich, Rzeszów, Pollando.

S-o Lazarz Berliner, Lodz, Pollando, Konstantynowska 42, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o Max Hubl, Salzburg, Aŭstrio, Auerspergstr. 54, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

Fervojistoj, skribu poŝtkartojn al leterojn al mi, por ke mi propagandu Esperanton inter miaj samfakuloj. As- stento Sorensen, Gerrildbanen, Grenaa, Danlando.

Socialistoj en la tuta mondo, sendu tuj vivsignon al kamarado Jens Alby, Urba konsilantaro, Bredgade, Grenaa, Danlando. Volonte ricevas propagandilojn, presajojn ktp. por ekspozicio; resendos ĉion laŭ dezire.

Du energiaj filatelistoj, ankaŭ skoltoj, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Sendu 100 aŭ 200 poŝt- markojn al Volmer Rosenkilde aŭ Arne Meldgaard N, ambaŭ en Grenaa, Danlando. Skribu pri Esperanto kaj Skoltismo en via lando.

S-o Petro Fedotov, termezuristo, Rusio, Simbirska gubernio, poŝto Riŝĉeva Kamenka, vilaĝo Kočetovka, deziras korespondi kaj interŝanĝi kun artamantoj; respondos per poŝtkartoj kun artaj pentraĵoj de sia laboro.

S-o M. P. Bokanov, p. o. Kurakino, Orlov gub., Ruslando, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri literaturo, filozofio, religio.

S-o Pedro Juarez Cano, Box 148, Santa Clara, Cuba, deziras korespondi kun ĉiulandanoj per leteroj, poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

S-o H. van Beek, del UEA, petas korespondadon por 8 komencantoj por poŝtkartoj ilustr. Sendu ĉion al jena adreso: Beliesstraat 7, Dordrecht, Nederlando.

W. Schubert, Trautenau, Hauptplatz 2, Ĉeĥoslovakujo. Mi sendis 35—50 diversajn ĉeĥoslovakajn poŝtmarkojn por la sama kvanto da poŝtmarkoj el via lando.

Serion da ukrainaj poŝtmarkoj (8agi, ne stampitaj) vendas s-o G. Kiŝnevsĵij kontraŭ unu ŝvica franko. Kvanto nelimitata. Adreso: G. Kiŝnevsĵij, str. A. Voltolanu 6, Bendery-Tighina, Besarabio, Rumanio.

Doktoro (kuracisto) P. J. Tonkov deziras korespondi kun ĉiuj dezirantoj, precipe kun germanaj kolegoj, laŭ la profesio. Adreso: Rusio, poŝto Dvorjansko, Simbirska gub., la popola kuracejo (ĉe-Volgujo, la malsatanta regiono).

S-o G. Woud, Noord 95, Wormerveer, Holland, petas ĉiun sendi al li bildon, gravuraĵon aŭ karton (ankaŭ malnovaj tagaĵas, kun vidaĵoj de ĉiuj ventumlejoj). La del. de UEA suprenomita respondos, laŭeble per karto aŭ malnova Esperantaĵo.

S-o V. Bonde, Stenslund 2, Falun, Sved., deziras korespondi kun gebontemplanoj ĉiulandaj.

S-o Matti E. Mäkelä, 16 jara liceano, P. Rautatiek. 15 A, Helsinko, Finnlando, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj, leteroj k. a.

S-o Otto Charvát, fervoja oficisto, Trnava, stacidomo, Ĉeĥoslovakio, petas pardonon al siaj korespondantoj, ĉar li nuntempe estas treege okupata per oficialaj laboroj; ĉiu ricevos respondon.

S-o Matevski sendas por 50 gmk. 36 dentumitajn kaj 31 nedentumitajn poŝtmarkojn de Meza Litovio. Por 40 malsamaj mi sendas 35 pm. Vilno, Vilenska 27—4.

Wiljo Saaristo, Wiborg, Finnlando, deziras interŝanĝi pm. F-ino Elise Tham, instruistino, Hohenelbe 153, Ĉeĥoslov., deziras anglan, francan kaj Esperantan korespondadon kun anglaj kaj francaj samideanoj.

Trautenau, Ĉeĥoslovakio, s-o Bruno Gahler, Anastasiusz. 3 serĉas por si mem kaj por samideanoj korespondantojn el la tuta mondo. Li interŝanĝas poŝtmarkojn.

S-o Aleksandro Fekecs, Budapeŝt VI, Szony strato 88-II-17, Hungario, deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn (bfl.) kaj papermonon kun ĉiuj landoj.

S-o Rudolf Müller, Georgplatz 44, Brand-Erbisdorf (Saksujo, Germ.) serĉas tutmondajn samideanojn por korespondi kun ili pri ĉiuj aferoj. Li ankaŭ kolektas Esperantaĵojn.

## Peto.

Nia movado bezonas ĉiaman propagandon. Mi petas do tiucele la tutmondan gejunularon kaj pli aĝajn personojn sendi al polaj gelernantoj de popolaj kaj burĝaj lernejoj simpatajn salutojn, interesajn sciigojn el via lando, urbo aŭ vilaĝo, mallongajn priskribojn, bonajn konsilojn aŭ ion similan en Esperanto. Ankaŭ malproksimaj fratoj japanaj ne forgesu pri ni. Mi presigos ĉion laŭvice en la organo de polaj gelernantoj en pola kaj eble ankaŭ en Esperanta lingvoj. Tiamaniere ni atingos krom intereso pri Esperanto ankaŭ simpatian por ĝia interna ideo. La cirkonstancoj por nia movado ne estas ĉe ni tre favoraj; vi multe helpas favorigi ilin tiamaniere. Alsenditajn interesajn ilustraĵojn mi proponos reprodukti en nomita gazeto. Ĉiujn korespondantojn bonvolu adresi: J. Kaszycki, Kraków-Grzegórzki, Polujo.

## Autoroj Esperantistaj atentu!

Ni fondis Esperantan bibliotekon en nia urbo, kie Esperanto estas tre disvastigita. Por ke via verko ankaŭ estu reprezentata kaj legebla en nia biblioteko, bonvolu sendi senpagan ekzempleron el via verko, je la adreso: Rozalio Wagner, bibliotekistino, Timișoara IV, Bul. Carol I, n-o 9. La poŝtelspezojn ni volonte pagos.

## Diversajn Mur-Reklamajojn

komercajn, socialajn kaj aliajn, skribitajn en ĉiu ain nacia lingvo (aŭ ankaŭ en Esperanto) mi, la subskribinto, kolektas laŭ la komiso de l' komerca kaj industria fako de Urboficejo Tokio, kies estro promesis rekompence sendi al la sendintoj tiujn japanajn (speciale de la granda Ekspozicio aranĝota en Tokio 1922).

Se la kolektado sukcesos, oni poste aranĝos la ekspozicieton speciale por tiaj reklamajoj, kio certe utile efikos por ambaŭ: komerc-interkomu- niko internacia kaj disvastigo de Esperanto.

La interesiganto bonvolu tuj sendi ilin al la subskribinta delegito de UEA aŭ al

S-o S. Kaŭaŝima

Fakestro por Komercu kaj Industrio, Urboficejo Tokio.

Kun antaŭdanko subskribas

Morizo Ga, del. UEA,

16-V, Kitamači Aojama, Tokio.

## Abonejoj de ET

en la landoj

Aŭstraj: Ferd. P. Huber, Mönchsberg 5, Salzburg; por Wien „La Esperantisto“ (d-ro E. Pfeffer), Wien II/1, Postamt 34  
Belgaj: Frans Schoofs, 48, Kl. Beerstraat, Antwerpen.  
Bulgara: Georgi R. Gaŝevski, Bul. Marie Luiza 46, Sofio.  
Ĉeĥoslovaka: Otto Sklenčka, Hradec Kralové. Otto Lumpe, Trautenau.

Estona: Est. Esp. Unuiĝo, poŝtkast 6, Tallinn.  
Finna: O/Y. Movado A/B., Kasarminkatu 20, Helsinko.

Franca: Esp. Centra Librejo, 51 rue de Clichy, Paris 9.  
Hispana: Konrado Domenech, Ĝerono, Rambla Alvarez 12-2.  
Hungara: Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.

Japana: Morizo Ga, 16-V, Kitamači, Aojama, Tokio.  
Litova: Paŭlo v. Medem, Smellu g-ve 12, Kaunas (Kovno).

Pola: Adolfo Oberroman, Krak-Przedm. 10, Warszawa. (P. K. O. n-o 3125). — Pola Esp. Servo (Fr. Prengel), Kordeckiego 1a, Bydgoszcz-Bromberg.

Rumana: Esperanto-Oficejo Cluj.  
Sveda: Förlagsföreningen Esperanto, u. p. a., Stockholm 1.

U. S. A.: The Esperanto Service Corporation, 500 Fifth Avenue, New York City.

Filatelistoj atentu! S-o Meħall Milčev, del. UEA, (apoteko S. Menahemov), Varna, Bulgario, vendas pogranda kaj malgranda tre favore bulgariajn markojn. Postulu prezojn! Korespondas Esperante, germane kaj france.

S-o Kurt Klinger, Chemnitz, Sa., Germ., Annabergerstr. 85, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj leteroj kun ĉiulandanoj.

S-o Paul Hiller, instruisto, Neustadt O.-Sa., Unt. Mühlstr. 10, Germ., deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj (speciale geografaj) kun ĉiulandanoj.

Filatelistoj! Mi liveras poŝtmarkojn de Germanujo, Memel, Saar, Allenstein, Silezio, Danzig, Bayern. Postulu pre- tabelon! S-o Schultze, Rogzow apud Köslin, Pommern, Germ.

Hermann Schmidt, Unteraltenburg 10, Merseburg, Germ., deziras korespondi precipe kun fratinoj ĉiulandaj per ilustr. poŝtkartoj (bfl.), leteroj, interŝanĝas ankaŭ Esp. gazetojn.

Kiu homamiko pruntedonas al laboremaj geedzoj dekmlil germ. markojn por pligrandigi fondatan laborejon en rejlanda grandurbo. Bonvolu skribi sub signo „Rejno“ al la administracio de ET.

Erich Pfeifer, Hattingen (Ruhr), Germ., Neustr. 25, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo.

S-o Friedrich Hahn, Bremen, Riensbergerstr. 22, Germanio. Mi korespondus volonte per ilustr. poŝtkartoj (bfl.) kaj interŝanĝas poŝtmarkojn kun la tuta mondo, uzante la Esperantan, germanan aŭ anglan lingvon.

40 geknaboj (14-jaraj) serĉas korespondantojn el neger- manaj landoj. Skribu al Paul Hiller, instruisto, Neustadt, Oberschlesien, Unt. Mühlstraße 10, Germanio.

Eisleben, Germ., Halleche Str. 68, Wilh. Lange, interŝanĝas ilustr. poŝtkartojn (bfl.) kaj poŝtmarkojn.

Kiu helpas fortiĝi la fervoron? — 20 germanaj linguelogantoj de la ĉeĥoslovaka limo, anoj de jusa finita unua kurso, deziras uzi nian lingvon kaj serĉas gekorespondemulojn fremdlandajn, ne el Germanujo kaj Ĉeĥoslovakujo. Ili ankaŭ deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, ŝtatan kaj help- monon, propagandilojn kaj bildojn kun belaj inaj popolitaj. Ni respondos al ĉiu. Oni bonvolu skribi al Martin Hirsch, Germanlando, Altwasser en Schlesien, Poststr. 16.

S-o H. Bendix, komercisto, Breslau, Augustastr. 166, II., volas interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn.

La katolika societo petas gekorespondemulojn por siaj gelernantoj. Petoj direktotaj al la gvidanto de la kurso, s-o J. J. v. Wensveen, Warmoesstr. 118, Wormerveer, Nederlando.